

# bulgara esperantisto

MONATA REVUO

OFICIALA ORGANO DE LA BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO


Recom. de la Ministerio de publika instruado per cirkulero № 5677 de 3. II, 1938

JARO XXII

S O F I A

Septembro kaj Oktobro 1941

7-8



**IVAN MINČOV VAZOV**

*patriarĥo de la novbul-  
gara literaturo*

(1850—1921)

## Nia kulturhistoria misio

La esperantismo estas pli ol unu pure lingva afero. Bazita „sur neŭtrala lingva fundamento“, ĝi jam fariĝis potenca kultursocia movado. La Bolonja deklaro ne esceptas la principon, laŭ kiu Esperanto estas „vivanta lingvo de vivanta popolo“. Respektante ĉiujn naciajn ŝtatojn kaj kulturojn, ni, esperantistoj, sentas, ke la homaro kvazaŭ iĝis graveda kaj baldaŭ naskos novan popolon, kreonton de nova kulturo, kies pioniroj ni deziras esti. Organizati tiun ĉi supernacian popolon kaj konstrui la novan kulturon — jen estas nia granda historia tasko.

La etimologio de la vorto „kulturo“ venas de la latina verbo *colo, colui, cultum* kaj havas signifon de „io plantata, zorgata kaj kreskigata“. En simila senco ni uzas la vorton „agrikulturo“. Tial oni ofte komparas la kulturon al ia kreskaĵo (ekz. greno, arbo aŭ floroj), pli prave — al ĝardeno kulturata. Efektive, se oni studas la historion de la homaro, oni certe konstatos, ke la civilizacioj, kiuj es'as eksteraj manifestaĵoj de la kulturoj, prezentas simptomojn de vivantaj organismoj: ili naskiĝas, kreskas, floras, maljuniĝas kaj pereas simile al la vegetaĵoj. Ili aperas jen en Afriko apud Nilo, jen en Azio preter Gango, jen en Ameriko ĉirkaŭ Niagaro, jen en Eŭropo apud Tibro, Seno aŭ Danubo.

En la komenco, modesta nombro da individuoj, unuigitaj de komuna celo aŭ de reciprokaj interesoj, interkonsentas por kunlaboro kaj interhelpo. Ĝenerale ĉiuj anoj, partoprenantaj tiun ĉi neskribitan kontrakton, loĝas la saman teritorion, parolas la saman lingvon, obeas la samajn leĝojn, regulojn aŭ principojn, konfesas la saman etikan aŭ religian kredon, havas komunajn politikajn, sociajn aŭ moralajn normojn. Ili formas la komencan trabaron, la materialan kernon de estonta grandioza konstruaĵo.

Tiel kreiĝas la unua simpla socia organismo, embrio de ĉiu ŝtato, nacio aŭ kultura socio. Ĝiaj organoj ankoraŭ mal-

rapide ĝermas, la trajtoj de ĝia fizionomio apenaŭ formiĝas. Ĝi kreskas iom post iom kaj stabiliĝas dank'al la solidareco de siaj anoj. Komence tute senorda kaj neperfekta, ĝi baldaŭ organiziĝas. La komuna celo harmoniigas la materiajn aŭ spiritajn interesojn kaj la malrapide formiĝanta kolektiva volo nivelas la diverĝemajn tendencojn de la apartaj individuoj. Sed en la bazo de ĉiu naskiĝanta kulturo ni trovas ian altan spiritan idealon, ian „internan ideon“, al kiu gravitas kaj konverĝas ĉies pensoj, sentoj kaj agoj. Ĝi unuigas la animojn, inspiras kaj instigas ilin al heroaĵoj kaj abnegacio. Sen tiu ĉi potenca ligilo la socia organismo restus neagokapabla homamaso, kiu baldaŭ disfalus.

La germana filozofo Oswald Spengler, kiu provis fari skizon de mondhistoria morfologio, asertas, ke ĉiu kulturo estas esprimo, „eldiraĵo“ de unu fundamenta ideo kaj de unu specifa pensmaniero. Ekzemple, la greka kulturo esprimis la ideon de la beleco (apolonismo), la araba kreskis sub la signo de la magio kaj la okcidenteŭropa enkorpiĝis la pensmanieron de d-ro Faust (demonismo). Ili ĉiuj havis similan historion, similan biologion, similan evoluon kaj similan sorton — sed malsaman idearon kaj mondkoncepton.

La etikaj, sciencaj, sociaj kaj ekonomiaj atingiĝoj de ĉiu kulturo elkreskas unuj post aliaj, simile al la branĉoj, la folioj, la floroj kaj la fruktoj de la kverko. La giganta kreskaĵo foje atingas nekonjekteblajn dimensiojn, ofte etendas siajn branĉegojn sur vastajn teritoriojn kaj, montrante fabeldn riĉecon da materialaj kaj spiritaj verkoj, ofte ŝajnas esti vera miraklo. Sed la mistera forto, la „enteleĥio“, kiu movigas kaj kreskigas la kulturojn, de post ilia embrio ĝis ilia dekadenco, konsistigante la fundamenton de tiuj ĉi vivantaj kolektivoj, estas ilia interna ideo.

Post longa kreskado kaj florado, la sociaj organismoj, simile al la vivantaj

kreaĵoj en la naturo, estas kondamnitaj maljuniĝi, kadukiĝi kaj fine morti. Tia ŝajnas esti nun la sorto de nia eŭropa kulturo, se oni juĝas laŭ la lastaj okazintaĵoj. Konforme al la severaj historiaj leĝoj kaj psikosociaj imperativoj, la okcidenta kulturo rapide marŝas al pereco. Ĝi jam pasis la ŝtupojn de infaneco, de kreskado, maturiĝo kaj dekadenco kaj nun prezentas ĉiujn simptomojn de malrapida agonio. Ĝiaj politikaj sistemoj, ĝia ekonomia ordo, ĝiaj sociaj aranĝoj kaj ĉefe la ŝtoniĝinta pensmaniero kaj mondkoncepto de ĝiaj socianoj ŝajnas neadapteblaj al la materia kaj spirita evoluo de la nova homaro.

La triumfa marŝo de la progreso, la rapida kreskado de la scienco, de la tekniko kaj de la industrio, sed precipe la perfektigo kaj la plidensiĝo de la komunikiloj estas neakordebla kun la nuntempa lingva haoso, kiu kaŭzas unue psikan, poste materian, ekonomian, industrian, financan aŭ eĉ politikan haoson kaj starigas barojn inter la popoloj, dividante ilin idee kaj spirite. Tiuj ĉi cirkonstancoj estigis evidentan malekvilibron inter la efektiva kulturŝtato de la popoloj kaj la senlimaj kreopovaj eblecoj al ili malpermesitaj pro ilia nacia, politika, idea kaj ekonomia dividiteco. Jen estas unu el la ĉefaj kaŭzoj de la konfliktoj kiuj nun ekstermas la homan genton. Plenuminte sian historian mision, la eŭropa kulturo, simile al Zarathustra sur la alta monto, atendas la unuan fulmon kiu finigos ĝian karieron. Konsiderante la apokalipsan dezertigadon de la furiozanta kaptaklismo, la objektiva observanto rajtas supozi ke la fatala horo por nia kontinento sonis.

Sed la eklipso, eĉ la estingiĝo de unu kulturo ne haltigos la marŝon de la historio kaj de la progreso. La spiritaj fortoj de la popoloj kaj la kreopova potencialo de la homaro neniam elĉerpiĝos. El la amasoj de la milionoj da kadavroj, el la cindroj de la multekostaj urboj, katedraloj kaj kasteloj stariĝos la trabaro de nova kulturo. Fabela konstruaĵo elkreskos sur la ruinoj de la malnova mondo — samkiel la kristana civilizacio

kreskis sur la detruitaj arenoj de la Romaj cirkoj. Kaj tiu ĉi konstruaĵo sin apogos sur la fundamentoj de la lingvo Esperanto kaj de ĝia nobla idealo.

Nia esperantista kulturo nun ĝermas; la nova „regno“ nun komenciĝas. Ĝia spirita bazo estas la nova sento: espero pri feliĉa estonteco, pri perfekta sociekonomia ordo. Ĝia interna ideo estas la homaranismo. Tiuj ĉi du „kolonoj“ estas sufiĉe fortaj por servi kiel solida fundamento de la nova kulturo. Masonado de tiu ĉi simbola citadelo estas tasko kaj misio de ĉiuj Esperanto-pioniroj. Nia lingvo kreos la taŭgan psikan atmosferon de homamo kaj interpopola kompreniĝo, nia interna ideo havigos al la juna „organismo“ konvenan temperaturon kaj spiritan klimaton necesan por ekfloro de la plej noblaj sociaj virtoj, kaj nia movado mem elradios la unuajn kadrojn kaj prototipojn de la estontaj kulturformoj. La detalojn de tiuj ĉi formoj ni hodiaŭ apenaŭ povas konjekti. La praktiko, la estonta laboro, la vivo mem instruos nin pri la planoj, vojoj kaj metodoj. Sed la ĉefaj konturoj de la fabela konstruaĵo jam skiziĝis en la analoj de nia kvindekjara movado kaj en la menso de ĝiaj idealemaj pioniroj.

Post la pereco de milionoj da homoj, post la materia kaj morala detruo kaj dezertigo — antaŭ ni, esperantistoj, montriĝos nia granda kaj nobla kulturhistoria misio: eltrovi la plej honestajn, etike stabilajn, progresemajn kaj agokapablajn reprezentantojn de la homa speco, unuigi ilin spirite sub la signo de nia plej alta idealo esperantista, kaj el tiu ĉi morala kaj intelekta elito krei fortan popolon, nevenkeblan pacarmeon, kiu konstruos la fundamentojn de la nova homaro kaj de la nova kulturo sur la cindroj de la nuna kaduka civilizacio. Niaj Esperanto-klubo kaj lokaj societoj aŭ grupoj fariĝos fokuso de la nova kultursocia movado, samkiel la mezepokaj monaĥejoj estis centroj de la kristana spirita kaj socia vivo. Ĉu la bulgara libero kaj ŝtato ne elkreskis sammaniere el la unuaj preĝejoj, skoloj, monaĥejoj kaj legejoj — fajrujoj de nia nacia renesanco?

*La solida lingva fundamento realigos la spiritan unuecon de la nun naskiĝanta esperantista popolo; la idealismo kaj la entuziasmo de ĝiaj pioniroj garantios la triumfon de nia kaŭzo; kaj la interna ideo, la alta komuna idealo de la espe-*

*runtistoj, donos al nia movado neimagib'e fortan mensan potencialon, kapabla elektrumi kaj inspiri la novan popolon, instigante ĝin al heroaĵoj kaj venkoj en la batalkampo de la progreso.*

D-ro St. Ĝuĝev

## ELEKTITAJ PAĜOJ EL LA BULGARA LITERATURO

VASIL VODENIĈARSKI

# CIGANOJ

Iliaj domoj estas malgrandaj, pajlokovritaj kaj disĵetitaj, kiel per ŝelko, sur «Majmun bair». De ĉi tiu monteto oni povas vidi la tutan vilaĝon, la altaĵon »Vranĉova ĉuka« kaj la arĝentbrilan riveron fluantan sub ĝi. Kiam la vespero etendas siajn nigrajn flugilojn super la kamparon, super la vilaĝon kaj la ĉirkaŭajn montetojn, sur la vojo, kavigita de la pluvegoj, ekrampas al »Majmun bair« malgrandaj dolorpremitaj homfiguroj kun brilnigraj vizaĝoj kaj kun brakoj balanciĝantaj kiel rompitaĵoj branĉoj.

Ciganoj.

Ili posedas nek brutaron, nek teron. De sunleviĝo ĝis sunsubiro ili streĉas la fortojn, gajnas dudek — dudekkvin levojn, kaj vespere mortlacaj revenas sub la malaltajn pajlajn tegmentojn. Jen ekbrilas la fenestroj, aŭdigas sin ĉifonvestaj ĉokoladvizaĝaj ciganidoj. La monteto reviviĝas.

En la randa terdometo, la unua ekde la kamparo, loĝas Ali Mehmedov kaj lia maljuna patrino Kina. Juna kaj forta estas Ali. Por ĉio estas kapabla, oni lin serĉas, kaj al neniu li rifuzas helpon. Siajn dolorojn al li oni konfidas, konsilojn de li la ciganoj petas. Iliajn disputojn li solvas.

Ali estas la „Ciganestro“.

Dum infanaĝo li kamaradis kun plej petolaj bulgaraj knaboj. Jen korvaj nestojn ili detruis, jen pomojn ili forŝtelis, jen kun alikvartalaĵ knaboj ili interbatalis — Ali kaj Vladko, la filo de la vidvino Stoja, estis ĉiam en la unua vico.

Ambaŭ estis la plej diligentaj lernantoj en la klaso.

Ili elkreskis.

Vladko perdiĝis, vojaĝis jaron, du jarojn ien kaj revenis. Li revenis aliĝinta, parolis aferojn, kiujn de la komenco Ali ne povis kompreni. Ĉu Vladko, lia plej sincera amiko, mensogas? Ne, Vladko ne povas mensogi. Ali devis pripensi iomete por kompreni. Penadis, ŝvitis Ali, kaj fine komprenis la simplan veron: kial la domoj de la ciganoj estas pajlokovritaj, kaj kial »Majmun bair« estas cigana kvartalo.

Kaj Ali fariĝis vilaĝestro.

Vespere, post laboro, antaŭ la terdometo de Kina, sub la maljuna ĉerizarbo kunvenas la loĝantoj de »Majmun bair«. La maljuna Uso sidiĝas kontraŭ ĝi turkmaniere.

— Ali, filĉjo mia, rakontu al ni fabelon!

— Kiun fabelon mi rakontu, avo?

— Rakontu pri la malproksima lando, pri la ciganoj rakontu!

Sur la malgrasa nigra vizaĝo de la maljuna cigano trakuris hela rideto, el la kvietita rigardo ekbriletis muta ĝojo. Ali rakontas pri la ciganoj, pri ilia alfabeto, teatro, kantoj...

— Kantoj... e-eĥ, sopiras Jutko, samaĝulo kaj bona amiko de Ali, — mi tre ŝatas la kantojn.

— Vi ŝatas ilin, Jutko, kaj vi kantas ilin, sed nur zorgoplenaj kaj plorigaj estas viaj kantoj.

— Kion mi faru? Mi ne povas kanti aliajn.

— Vi estas kapabla, kantu pri alio, pri la bono.

— E-eĥ... — denove sopiras Jutko kaj mallaŭte ripetas sian malnovan pe-

ton: — Ali, konsentu kun mi! Kiel bovo mi laboros, ni gajnos monon por vojaĝelspezo, sed ni iru!

Ali rigardas lin malkontente, sed milde, kaj eble lastan fojon ripetas:

— Ne, fraĉjo, nenien ni iru. Ni devas resti ĉi tie. Tie ĉi ni estas pli necesaj.

Jutko eksilentas

Silentas ankaŭ la aliaj.

La vespervento eksusuras en la branĉoj de la ĉerizarbo. Jutko prenas sian propramane ellaboritan mandolinon, metas la fingrojn sur la kvar kordojn kaj tra la senbrua somera nokto disportiĝas la ĉagrenoplenaj sonoj.

Jutko kantas:

Ve, sufoke estas,  
ve, ĉagrene estas  
al mi, la cigano.

Ali rigardas la mallumon antaŭ si. La vilaĝo silentas. Maldensa blua nebulo rampas super la rivero. La penso de Ali ne rampas: ĝi kuras tra la stepoj, tontras en la ventego de la laboro, brulas en la libervola sango de liaj samlandanoj. La malgrandaj ciganidoj, gapante al la buŝo de Jutko, englutas ĉiujn vortojn, ĉiujn tonojn de la muzikinstrumento. La geciganoj klinas kapojn, fiksas rigardojn sur la malmolan teron kaj malgaje aŭskultas:

Panjo mia estas fremda lando,  
paĉjo mia — la laboro nigra,  
Ve, sufoke estas,  
ve, ĉagrene estas  
al mi, la cigano.

Dolore spiras la maljuna Uso. Lia brusto fajfas kiel disŝirita forĝista fajroblovilo. Sur liaj nigraj grasmakulaj vangoj fluas larmoj:

— Jutko, filĉjo, ĉesu! Ĉi tiu kanto pikas mian koron.

— E-eh, avo Uso!...

Jutko saltas lerte, kaptas la ŝultrojn de sia amiko, ekskuas ilin, fiksas lin kvietan rigardon, kaj emocie ripetas: — Ali, estu mia frato, konsentu kun mi, nudpiede ni ekiru, piedire ni atingos, nur tien ni iru!...

Ali karesas per mano la bukajn harojn de Jutko, pinĉas lin vangon.

— Ne, Jutko, nenien ni iros, fraĉjo, ni devas tie ĉi resti, Tie ĉi ni estas pli necesaj...

Eksilentis li, poste aldiris:

— Sed ĉi tiu via kanto estas pli bela ol la aliaj.

Jutko droniĝas rigardon en la kvietajn okulojn de sia kamarado, prenas la muzikinstrumenton kaj silente ekpaŝas al sia terdometo. Ankaŭ la aliaj disiras kunportante en siaj animoj la ĉagrenon de Jutko kaj la kredon de Ali.

Ali restas sola. La luno eknaĝas super „Vranĉova ĉuka“, respegulas sian vizaĝon en la rivero, malrapide aliras la kruitan ĉielan vojon. Tiam malantaŭ la dorona plektobarilo, elsub la terdometo iu silente tri fojojn ekfajfas. Ali leviĝas:

— Ĉu vi estas, Vladko?

— Jes, oni atendas nin.

Ambaŭ perdiĝas en la mallumo.

Jutko, sidiĝinta antaŭ sia kabaneto kaj direktinte la rigardon al la senbrua malproksimo de la somera nokto, elverŝas sian ĉagrenon, la sopiron de sia libervola sango:

Ve, sufoke estas,  
ve, ĉagrene estas  
al mi, la cigano.

La vilaĝo ekdormas. Neniu sentas la ĉagrenon de Jutko, nur Ali ĝin komprenas.

La luno, disŝutante la oron de siaj molaj haroj, karesas la brilnigran vizaĝon de la cigano.

El bulgara: *Cano Todorov*

## Bulgaraj popolaj proverboj

Eĉ sen kokokrio mateniĝas.  
 La ĝardenisto deziras pluvon, la brikisto — sunon.  
 Ĉiu hundo antaŭ sia pordo bojas.  
 Ne ekzistas arbaro sen lupoj.  
 En la regno blindula reĝas la homo unuokula.  
 Ligu pastron, por pacigi vilaĝon.  
 Korvo al korvo okulon ne pikas.  
 Kulpulo nepersekutate forkuras.  
 Unu ludas la timpanon, alia kolektas la monon.  
 Du hundinoj el unu telero ne manĝas.  
 La ĉevaloj sin piedfrapas, la azenoj suferas.  
 Antaŭ ol mortpafi la urson, ne vendu ĝian felon.  
 Ligna prenilo fajron ne tenas.  
 Virino ridas, kiam povas, kaj ploras, kiam volas.  
 Al bovino malbona Dio kornojn ne donas.  
 Ne donu kandelon al blindulo kaj vinon al drinkulo.  
 Anstataŭ kombi la brovojn, li elpikas la okulojn.  
 Malaltan azenon ĉiu facile ekrajdas.  
 Ne nombri la dentojn de donacita ĉevalo.  
 Ne aĉetu domon, aĉetu najbaron.  
 Ne povante bati sian edzon, ŝi batas liajn pantalonojn.  
 Fajron per pajlo ne estingu.  
 La lango ostojn ne havas, sed ostojn rompas.  
 Al stultaj okuloj okulvitroj ne utilas.  
 Sub bovo bovidon li serĉas.  
 Timigita besto dornojn ne rigardas.  
 Kune kun la seka brulas ankaŭ la malseka (arbo).  
 Kovritan lakton katoj ne lekas.  
 Ekkaresu ciganinon — ŝi nigrigos vin.  
 Malplena kalabaso pli forte bruas (ol plena).  
 Frua birdo frue kantas.  
 Kolektu hufnajlojn por aĉeti ĉevalon.  
 Modesta vulpo la kokinojn formanĝas.  
 Sekaj kalsonoj fiŝojn ne kaptas.  
 Se ĉiu muŝo mielon kolektus, la skarabo kolektus plej multe.  
 Ĉiu miraklo tri tagojn (daŭras).  
 Lupo viandon ne gardas.  
 Bubalo muŝon ne timas.  
 El vortoj supo ne estiĝas.  
 La hundo maljuniĝas pro kurado.

Tradukis *St. Ĝ.*

ILIJA MARINOV

## KANTO DE LA PLUGISTO

Antaŭ mateniĝo, kiam ekremetos la aŭroro,  
 kaj per fajraj vipoj nokton ekforpelos —  
 mi dinove iros sur kamparon foran  
 kun la grizaj bovoj — kamaradoj plej fidelaj.

La aeron mi rompados per malgaja kanto,  
 per la kanto de la fratoj — fratoj laŭ sufero —  
 kaj per faga plugilego ĝis vespero surfalanta  
 fendos mi malmolan bruston de la tero.

Kaj vi min ne atendadu frue, panjo,  
 ĉar plugilo pezas, sulkoj longaj kaj malmolaj,  
 longaj kaj malmolaj, nigraj kiel vivo vilaĝana,  
 jen droniĝis en la larmoj kaj ĉagreno senkonsola...

El bulgara lingvo tradukis: *Rimma*

ORIGINALAJ VERKOJ EN ESPERANTO

## FABELO PRI NASKIĜO DE VORTO

I.

Ĉu estis, ĉu ne estis, sed jes, estis, eĉ ne ie trans la Fabeloceano, sed en la unua eldono de la Plena Vortaro, estis dudek-ok tre interesaj landoj. La dek-sepa nomiĝis *Molando*. Gi situis inter la 297-a kaj 322-a vortara dikeco, kovrante pli ol 83.000 liter-kvadratlokojn. Sed la reganto de *Molando*, lia reĝa moŝto *Mo*, multe enuis eĉ en tiom granda lando — ĉar li estis sola. Li sopiris al edzino.

Foje li decidis, ke dumnokte, kiam ĉiu *mu!o* dormas, li serĉos por si indan principon. Kaj vere, tiel okazis. Ĉiu jam dormis en *Molando*, kiam li forlasis la palacon. Li iris, iradis, sed la serĉatan principon li ne trovis eĉ post sep-kolona\* vagado, kiam li alvenis al la *Ma* maro. Krom malgranda boato li trovis sur la marbordo nenion. Kion fari? Li decidis plueniri laŭ la *ma-rab-ordo* kaj li alvenis la domon de sinjoro *Maŝo*. La ruzeta reĝo singardeme ĉirkaŭrigardis kaj, vidante, ke ne minacas danĝero, li eniris

tra la malantaŭa malfermita pordo la loĝejon. Je sia ĝojego li trovis hejme la geedzojn dormantaj: la ronkantan sinjoron *Maŝon* kaj — sinjorinon *Maŝinon*! Jen, kial li venis! — Tuj li displektis sinjoron *Maŝon* tiel, ke li ne plu povis moviĝi kaj liginte sinjorinon *Maŝinon*, li forportis ŝin en la boaton kaj ordonis al ŝi veturigi lin trans la maron, kie li esperis trovi la principon. Trankvila li ekvojaĝis. Eĉ la rugiĝanta kaj palpebrumanta *marabuo* neniel ĝenis lian reĝan moŝton. — La onde lulanta maro baldaŭ endormigis lin kaj la venteto alportadis al la reĝo dolĉajn sonĝojn pri la serĉata principo...

## INTERMEZO I.

La bona flava maljunulo de la ĉielo, la ĉiam ridetanta Luno, ĉirkaŭsvarmita de la hele brilantaj steletoj, kuŝiĝis kun ili sur la ĉiela blua tapiŝo... Li rakontis al ili pri belegaj landoj, pri feoj kaj feinoj de fremdaj mondoj, kiujn ili vidis ŝvebi ĉirkaŭ la senfina tapiŝo... Poste li forŝovis la nubkurtenojn kaj, jen, aperis vasta scenejo kun ondanta maro. La on-

\* Kolono — mezuro en Vortarmondo.

doj laŭte plaŭdis kaj fiere levis siajn blankajn, ŝaŭmokrestajn dorsojn. Graciaj nimfoj eniris subite rajde sur la ondoj. Meze de ili staris la plej belega, ilia princino, kun perlukrono sur sia orhara kapo. La maro trankviliĝis kaj la nimfoj petole ekludis en la kristalpura akvo. Ĝojkrioj kaj ridoj eĥadis...

Malproksime sur la horizonto aperis malgranda boato, en kiu vojaĝis, en longa ruĝa mantelo, juna reĝo. La nimfoj haltigis la boaton, ĉirkaŭsvarmis ĝin kaj la princino, al kiu tre ekplaĉis la reĝo, proksimiĝis al li. La reĝo etendis siajn brakojn kaj per siaj fingroj li tuŝis ŝian susurantan silkan robon. Ambaŭ ĝojebrie ĉirkaŭbrakis kaj kisis unu la alian. Sed, ho, ve! En la plej dolĉa momento ĉiuj nimfoj, eĉ la princino, ree ŝanĝiĝis je akvo, ĉar laŭ la feinlanda leĝo ĉe ektagiĝo ĉiuj nimfoj devas malaperi en la maron. La malvarma mara akvo saligis la lipojn de la reĝo kaj defluadis sur la kostega mantelo — La nubkurtenoj kunkuris kaj la steletoj dankrigarde aplaŭdis al la Luno...

## II.

Frostiga malvarmo vekis lian reĝan moŝton *Mo* el liaj sonĝoj. Granda ondo superakvigis la etan boaton kaj eĉ lia belega mantelo tute malsekiĝis. Li kole-reĝis pri tia aroganteco, sed precipe tial, ĉar lia belega sonĝo tiom rapide forŝvebis. Li estis tre malgaja, la boato malrapide glitadis pluen. Ne daŭris longe kaj li rimarkis en la maro naĝantan inon. Konfuzite li alrigardis ŝin sed tuj poste ĉio klariĝis en lia menso: ŝi ja estis lia serĉata estonta edzino, ĉar ŝi vere estis *Mino*. Li prenis ŝin en sian boaton kaj bone ŝin kaŝis, ĉar ili estis en danĝera proksimeco de *mina-reto*. — Belega kaj

ĉarma ŝi estis. *Mino* ekamis la reĝon per sia forta kaj magneta amo kaj feliĉaj, ili decidis geedziĝi.

## INTERMEZO II.

Denove vesperiĝis. Steletoj sin svingis surĉielen kaj atendis la Lunon, kiu rapidis al ili sur la lakto-vojo. Grupiĝinte ĉirkaŭ li, ili aŭskultis lian fabeladon. Denove aperis el malantaŭ la disŝvebintaj nuboj scenejo kun maro. Sur ĝiaj ondoj sagrapide glitis belega jaĥto. Sur la ferdeko rave sonis muziko kaj ĝojis homamaso, ĉar gefianĉiĝa festeno okazis... La reĝaj gefianĉoj estis tre feliĉaj, sed malfeliĉa estis la princino de la nimfoj. Tie ŝi staris ĉirkaŭita de siaj ĉarmaj subulinoj. Eĉ en sia malfeliĉo ŝi estis belega. Kaj ĉi tiu diinsimila aperiaĵo flustris apenaŭ aŭdeble malbenajn sentencojn al la vojaĝantoj sur la jaĥto...

## III.

La jaĥto eniris havenon kaj la reĝo kun *Mino* veturigis sin en orumita kaleŝo al la reĝa palaco. Tie okazis la geedziĝa festeno. Ili ambaŭ, lia reĝa moŝto *Mo* kaj la belega *Mino* en la preĝejo aliris la altaron en longaj ruĝegaj manteloj, kaj kiam la pastro — benante la novajn reĝajn geedzojn — finis la pompan ceremonion, ili fariĝis — *ge-moj!* — La ĉeestantoj konsterniĝis, ĉar anstataŭ la *reĝaj ge-Mo-moŝtoj* antaŭ la altaro sur la ŝtupoj estis du grandaj rubenoj: *ruĝaj gemo-ŝtonoj*...

## IV.

La sekvintan tagon alvenis en la malproksiman *Go-landon* du *freŝpakitaj gemoj*.

*Slaoma Inawaŝi*

## ЕСПЕРАНТО научавате само за 2 месеца

Набавете си следнитъ помагала отъ Дим. Ивановъ само за 50 лв.

Пълень Есперанто-български речникъ, 15000 думи, цена 40 лв.

Есперанто картиненъ учебникъ за самуци и курсове, съ граматика, речникъ и читанка, бърза метода — 20 лв. Есперанто-бълг. разговорникъ — 6 лв. Суми

изпращайте по пощ. чек. с/ка 3810 на автора ДИМ. ИВАНОВЪ, Русе, „Н. Рилски“ 80.

Доставя се „БАЙ ГАНЮ“ отъ Ал. Константиновъ, на есперанто 15 лв. Искайте каталога безплатно.



VORTOJ DE ZAMENHOF**Dangereco de plibonigoj***(Letero al Seynaeve)*

Vian ideon pri la aranĝo de internacia kongreso de Esperantistoj mi trovas tute bona. Sed por ke tia kongreso donu al nia afero ne malutilon sed nur utilon, ĝi devas esti aranĝita laŭ la sekvantaj principoj:

1) Ĝi devas esti bone kaj zorge aranĝita, havi multe da partoprenantoj kaj havi la karakteron de granda, solena kaj imponanta festo de internacia frateco, por ke la gazetoj de la tuta mondo multe parolu pri ĝi kaj por ke ĝi estu plena de entuziasmo kaj veku en la tuta mondo entuziasmon kaj deziron aliĝi al ni. Krom paroloj oni devas aranĝi komunajn kantojn en Esperanto, eble eĉ ian internacian ludon aŭ publikan konkurson; oni devas aranĝi en ia granda teatro prezentadon de dramo en Esperanto. Oni devas antaŭe eksciti la interesigon de la tuta urbo, por ke al ĉiuj festoj de la kongreso venu drandega multo da gastoj neesperantistoj; — per unu vorto, oni devas fari grandan impreson kaj devigi la tutan mondon paroli pri la kongreso.

2) En la kongreso oni devas paroli pri organizado de nia afero, reciproka helpo en la batalado, pri rimedoj de propagando, pri kreado de granda kaj utila literaturo, k. t. p.; sed nenion, absolute nenion oni devas paroli pri iaj ŝanĝoj aŭ „plibonigoj“! Por ke nia lingvo atingu sian celon kaj ne difalu kiel Volapük, ĝi devas resti por ni absolute netuŝebla, tiel same kiel ĉiu alia lingvo, en kiu nenia persono ja kuraĝus proponi iajn reformojn, kvankam ĉiu el tiuj lingvoj estas multe malpli perfekta ol nia.

Nun al la demando pri Akademio. Jam tre longe mi pensas pri aranĝo de ia konstanta „Centra Komitato“, kiu prezentus per si la plej altan aŭtoritaton en nia afero kaj kiu sola havus la rajton solvadi ĉiujn dubojn, kiuj aperas en nia afero. Sed tia komitato devos decidadi nur pri demandoj dubaj; fari iajn ŝan-

ĝojn en la lingvo la komitato ne havos la rajton. Kun la aranĝo de tia Centra Komitato oni devas esti tre singarda, por ne fari ian danĝeran paŝon; tial mi nun publike ankoraŭ nenion parolas pri tio ĉi, sed mi konsiliĝados pri ĝi private kun diversaj amikoj. Kiam la plano post matura pripenso montriĝos bona, tiam mi publike proponos al la esperantistoj efektivi tiun planon.

Sed ĉu Centra Komitato estos fondita aŭ ne — tiu ĉi demando tute ne devas maltrankviligi niajn amikojn. Ĝiaj paroloj pri reformoj aŭ plibonigoj tute ne devas vin maltrankviligi, ĉar ili havas nenian celon nek estontecon. Ĉu Centra Komitato estos fondita aŭ ne — unu principo staras kaj devas stari tute forte, kaj la tuta mondo esperantista en la nuna tempo komprenas ĝin tre bone kaj certe batalos unuanime kontraŭ ĉiu ektuŝo de tiu principo; tiu ĉi principo estas: simile al ĉiu alia lingvo Esperanto devas esti rigardata kiel lingvo formita kaj netuŝebla. Paroli pri iaj plibonigoj (se ili estos efektive necesaj) ni povos nur tiam, kiam nia lingvo estos jam oficiala akceptita de la tuta mondo. Ĝis tiu tempo la netuŝebleco de la lingvo estas la plej fundamenta kondiĉo por nia progresado.

Mi parolas tion ĉi ne kiel aŭtoro de la lingvo, sed kiel simpla esperantisto, kiu ne deziras, ke nia afero difalu kiel la afero de Volapük. Kiel aŭtoro de la lingvo, mi pli ol ĉiu alia volus, ke ĝi estu kiel eble plej perfekta; por mi la retenigado de plibonigoj estas pli malfacila ol por ĉiu alia; kaj mi eĉ konfesas, ke kelkajn fojojn mi jam estis preta proponi al la esperantistoj kelkajn malgrandajn plibonigojn; sed ĝustatempe mi ekmemoradis pri la granda dangereco de tia paŝo kaj mi forĵetadis mian intencon.

Varsovio, la 27-an de Decembro 1903,

SLAOMA INAWAŜI

**ĈU VI REMEMORAS?**

Ĉu vi rememoras tiun belan horon,  
kiam vi dum danco ravis mian koron?

Ĉu vi rememoras sanktan la altaron,  
kie mi oferis al vi mian amon?

La sopiran spiron de l'kisemaj lipoj,  
la ĝisfundan trinkon de la amkalikoj?

Ĉu la lunajn noktojn dum promeno maja,  
ĉu la ardajn kisojn dum silento gaja?

Ĉu la fru-forpason de l'somero ĉarma,  
ĉu la folifalon de l'aŭtun' malvarma?

Jes, la folifalon, kiam la fatala  
trink' de l'amkaliko estis tre amara.

Tiam ni disiĝis. — Via koro bolas,  
nun alian amas. Mi sopire solas ....

... ĉu vi rememoras?

**FAMAJ VERKOJ DE LA BULGARA  
PENTRARTO.**

Cveta Ŝtilianova:

**Kapo de infano.**

**TUTMONDA ANTOLOGIO**

JOVAN DUĈIĆ

**SUNO**

Li naskiĝis apud Ionia Maro, sur la bordoj plenaj de suno, de malhelaj ĝardenoj kaj de palaj statuoj, kaj, kvazaŭ mevo, li batis sin en lazuro, lumo kaj odoro de la eterne varmaj akvoj. La patrino portis lin ofte tra la malvarmaj ombroj de la arboj kies foliaro disblovis odoron de la sonĝo.

Malfeliĉa poeto! Ankoraŭ infano, li foriris en regionon kie la ĉielo estas pala kaj frosta, en kiu brilas blanka kaj malvarma suno, kaj sur la bordoj ploras la ventoj. Kaj unu penso, kiel vundo, memorigis lin eterne pri lia sunplena bordo, malhelaj ĝardenoj kaj trankvilaj statuoj. Kaj, kune kun la marondoj kaj ventoj, li ploris amare kaj senkonsole sur la bordo de la melankolia, fremda maro,

Sed kiam blankiĝis liaj haroj, blondaj kiel velkinta foliaro; kiam iĝis malklaraj liaj pasiaj kaj belaj okuloj, kiuj iam havis koloron de la vintra citronarba branĉaro aŭ de la malprofunda maro; kiam en siaj vejnoj li eksentis la vintron, kiu ne havas sian printempon — la sorto venigis lin denove en Ionion.

Tie ĉio estis kiel antaŭe. Sed li ne plu estis la sama: la sunplenajn bordojn de la gaja kaj pasia Ionia Maro li ne povis rekonii! Dolore li kunpremris la okulojn kaj ekrigardis en sin mem. Kaj jen! Tie li vidis la sunon iaman, la strangan kaj grandegan sunon, kiu kaŭzis iam, ke ĉio vivis ĉirkaŭ li, ke foliaro havis odoron de la sonĝo, kaj ke li mem vidis la blankan kaj malvarman sangon de la statuoj, fluitan tra la trankvila ŝtono, igante ankaŭ ĝin vivi kaj suferi per la profunda kaj fortega pasio de la homoj.

Tio estis la Suno de Juneco, kiu forpasis, la suno kiu lumis ankoraŭ nur en la profunda vespera krepusko de unu animo, kaj kiu donadis al ĉio lumigita strangan kaj magian belon de Iluzio.

Ĉar la objektoj havas tian aspekton, kian nia animo donas al ili.

El la serba: *Josip Grandja*

MILAN RAKIĆ

## FORLASITA PREĜEJO

La malnova bildo de Kristo jen kuŝas,  
 El la ripoj nudaj fluas sangtorento;  
 La okulojn, lipojn palajn Morto tuŝas;  
 Sur la kapo — aŭreolo el arĝento.

Donac' de iama nobelaro pia,  
 La dukatoj oraj sur la kolo helis;  
 Sur la kadro — oraj' pura kaj gracia,  
 Kaj la kadron artist' el Debro ĉizelis.

Tia kuŝas Kristo en la templo sola,  
 Dum kviete falas la mallumo mola,  
 Kaj la birdoj noktaj al rabad' sin trenas.

Sola en la templo, kie temp' vampiras,  
 Malespera Kristo la manojn distiras,  
 Atendas adeptojn, kiuj ne alvenas...

El la serba: *Josip Grandja*

VOJAĜOJ

## REMEMOROJ DE HUNGARUJO

Malgraŭ la eksterordinaraj momentoj pro la nuna milito, kiujn la mondo travivas, mi decidis vojaĝi al Hungarujo.

Kvankam ke mi estis konsilita de miaj amikoj nun ne riski vojaĝon eksterlanden pro la milito, la 13-an de novembro 1940 mi forveturis de Sofia al Budapeŝto. La 14-an de novembro mi jam estis en Beograd. Pro la longa haltado de la vagonaro en la stacidomo de Beograd, mi utiligis la okazon trarigardi la ĉefurbon de nia okcidenta frata najbara lando, kaj konstatis, ke malgraŭ la slava fundamento de niaj lingvoj, mi malfacile komprenadis la serbojn.

La 15-an de novembro 1940, frumatene mi alvenis en la orientan budapeŝtan stacidomon „Kelety“, atendite de s-ino Sari S. Johan kun verda standardo en mano. Dum mia restado en Budapeŝto — ĉefurbo de Hungarujo kaj „Reĝino de la Danubo“ — mi trarigardis ĝiajn belecojn, dank al la tre afablaj budapeŝtaj gesamideanoj. Nek unu tagon mi restis sola, ĉiuvespere mi estis kune kun ami-

koj, babilante pri plej diversaj temoj. En Budapeŝto mi havis la feliĉon konatiĝi kun multaj geesperantistoj, precipe kun la fama poeto Julio Baghy, vicprezidanto de la Esperanta akademio, kun Prof. d-ro Francisko Erdey, D-ro Eugeno Szilagy, Prof. Mihalik k. a.

La Esperanto-societo en Vac invitis min esti gasto de la lokaj esperantistoj. La 20-an de novembro venis en Budapeŝto s-ro Kiraly Istvan, vagonarestro, kaj akompanis min ĝis Vac. Kiam ni alvenis en la stacidomon, mi vidis pli ol 20 gesamideanoj venintaj speciale por renkonti nin. Senfina estis mia ĝojo pro la tiel kara surprizo. Post la kutima interkonatiĝo, ni ĉiuj kune faris promenadon tra la urbo apud Danubo. Vespere ni havis komunan vespermanĝon en la fervojista klubo. Dum la vespermanĝado ne mankis tosto por la feliĉo de niaj du frataj popoloj. Post la vespermanĝo ni faris komunan fotografadon kaj venis la momento, kiam ni devis disiri. La adiaŭdo estis tre kortuŝa, kaj

ĉiuj bedaŭris ke mi ne povis resti inter ili pli longtempe. Mi neniam forgesos la gesamideanojn de Vac pro ilia afabla gastameco.

La 24-an de novembro mi partoprenis la esperantan sanktan diservon en la kapeleto „Koro de Jesuo“. La sankta ceremonio estis plenumita de la tre ŝatata s-no D-ro Fr. Erdey. Post la diservo ni

faris komunan fotografaĵon. La sekvantan tagon ni kunvenis lastfoje en la restoracio „Kie“, kaj parolis je diversaj temoj, precipe pri nia kara lingvo Esperanto. Ni ĉiuj konstatis, ke tre malfacile Esperanto progresas nun. Nia tago tamen venos.

Ivan K. Vasilev,  
Pazarĝik

### LINGVAJ DEMANDOJ

## Ankoraŭ pri la propraj nomoj

La aŭtoro de nia lingvo sendube penis ke ĝi estu plej bona rimedo por interkompreno de ĉiuj nacioj. Tamen eĉ ĝis nun estas tolerata en ĝi embaraso Nome, eĉ ĝis nun la esperantistoj, kies nacia alfabeto estas la latina, persiste skribas nacilingve en Esperanto-tekstoj la nomojn de personoj, urboj k. a. Ili kvazaŭ diras al la ceteraj esperantistoj: „Vi el-lernadu Esperanton, sed vi devas koni ankaŭ niajn naciajn lingvojn“.

Bone, sed kiel kompreni ties neklarajojn? Ja la ortografioj de tiuj lingvoj ne estas fonetikaj.

Antaŭ kelkaj jaroj ie en Eŭropo iuj ekdisputis, kia estas la nomo de la hinda verkisto Rabindranath Tagore: ĉu Tagore aŭ Tagór? Kaj iĝis bezono, ke oni letere demandu eĉ en Hindujo.

Mi ŝatas legi la verkojn de Julio Baghy, sed eĉ ĝis nun mi ne konas la elparolon

de lia nomo, ĉu Bági aŭ Baĝi ĝi estas. Kiel ĝi estas elparolata?

Tempo estas, ke oni forigu tiun ĉi neklarecon. Se ni skribas en internacia lingvo, ĝi devas esti tute internacia kaj ne miksitita. Ĉiun nomon de persono, urbo, rivero k. t. p. oni skribu ĉiam Esperant-litere, nepre metante la akcenton super la respektivan silabon, kaj, se estas necese, ke oni klarigu la nomon nacilingve, tio estufarata post la Esperanto-vorto inter parentezoj. Ekzemple: Ŝékspir (Shakespeare), Jugó (Hugo).

La neoportuno estas nur ke Esperanto ne havas ĉiujn nacilingvajn sonojn, sed ankaŭ tie ĉi oni devas trovi la rimedon. Oni skribu la proksimuman vokalon. Ekzemple: *ju* anstataŭ *ü*, *jo* anstataŭ *ö*, sed neniam oni lasu la leganton en dubo, kiel legi la nomon.

Preposto Geórgi Hristov

## Nia vivo

**Ĉe la blindaj esperantistoj.** La 8-an de junio okazis esperanta matenamuzo en la domo de la blinduloj. Multaj homoj de plej diversa aĝo — infanoj, junuloj kaj eĉ aĝuloj — ĉeestis la festan ceremonion.

Malferfis la amuzon la gvidanto s-ano D. Kolev. Per sia mallonga parolado li memorigis pri la granda utilo de Esperanto por la blinduloj. La plej kleraj homoj inter la blinduloj estas esperantistoj. Tio montras, ke Esperanto helpas ilian

klerigon. La plimulto el la gvidantoj de la blindula asocio estas ankaŭ esperantistoj. Fine, s-ano Kolev dankis al la direktoro de la instituto s-ro Dimitrov pro lia favora rilato al la Esperanto-laboro. La ĥoro de la gekursanoj plenumis la esperantan ĥimnon. Post ĝi sekvis aliaj ĥoraj kantoj, duetoj kaj solokantoj, deklamado de versaĵoj, dialogoj, muzikaĵoj, recitaĵoj kaj fine sceneto de Lev Tolstoj: „Grengrajno kiel ovo“.


Kortuŝa estis la granda penado kun

kiu oni plenumis la riĉan programon. Sur la blindaj vizaĝoj kontruriĝis ia festeco kaj soleneco.

Je la fino de la programo, s-ano Stojan Vasilev esprimis, je la nomo de la gastoj, sian admiron pri la laboremo kaj sukceso de niaj blindaj samideanoj. Li kuraĝigis kaj instigis ilin daŭrigi la laboron kun la sama entuziasmo: „Kvankam

lin pri la stato de la esperantismo en ilia loko kaj pri ilia propaganda agado, iniciatoj, entreprenoj, k. a. Tiel formiĝos iom post iom la spirita unueco de nia movado. Por krei kaj akceli tian kutimon, Bulgara Esperantisto publikigos en la rubriko „Nia vivo“ la nomojn de tiuj volontuloj, kiuj akceptas renkonti kaj inviti vizitantojn — esperantistojn el aliaj lokoj.

### PIONIROJ DE NIA NACIA RENESANCO.



**Paisij**

aŭtoro de la unua historio de la bulgara popolo

blindaj, ili pli bone vidas ol ni“. S-ro Dimitrov, direktoro de la instituto, ankaŭ esprimis sian kontenton pro la sukcesa programo kaj kuraĝigis la junajn pionirojn.

*Violin Oljanov*

**Rekomendo.** Ĉiu samideanoj, kiu vojaĝas en iun urbon aŭ vilaĝon, avertu nepre pri sia alveno la sekretarion de la grupo aŭ iun alian esperantiston, (se grupo ne ankoraŭ ekzistas). Tiamaniere la lokaj samideanoj povos kunveni kelkajn amikojn en kafejon aŭ en privatan domon okaze de lia alveno. Tiu ĉi praktiko subtenas la entuziasmon kaj kreas solidarecon inter ĉiuj membroj de nia rondo familia. La gasto tasku, per antaŭe preparita paroladeto, stimuli la esperantistan senton de la ĉeestantoj kaj instigi ilin al pli energia laboro. Reciproke, ili informos



**Vasil Levski**

apostolo de la bulgara libero

**Funebro.** Kun doloro ni sciigas niajn amikojn pri la morto de nia samideano kaj pioniro de Esperanto en Kotel — Svetoslav Iv. Manev. La Centra Komitato de B. E. A. kaj la redakcio de B. E. esprimas siajn kondolencojn al lia familio.

**Represigo el Bulgara Esperantisto.** La sveda gazeto Nia Parolilo, en n-o 6. de junio—julio 1941 j. represigis in extenso el „Bulgara Esperantisto“ la ĉefartikolon „Tri premisoj de nia sukceso“.

**Sankciita statuto.** Per ordono n-ro 6. de 31. I. 1941 publikita en la Ŝtata gazeto, n-ro 147 de 1941 j., la ministerio de la internaj aferoj sankciis la statuton de la Esperanto-societo „Espero“ — Panagjuriŝte. Bonan sukceson al la nova Esperanto bastiono.


**Por eviti la kursan takson.** Unu el la ĉefaj malhelpoj por la amasa lernado de Esperanto en Bulgarujo estas la alta mona kotizo kiun la ŝtato postulas de ĉiuj kursgvidantoj. Tion ĉi oni povus eviti organizante la studadon de Esperanto laŭ la tielnomata alilodidakta aŭ reciproka metodo: dum la regulaj kunvenoj de la grupo la progresintoj kaj

oni intencas organizi esperantistan ĥoron. La dusemajnaj prelegoj en Esperanto ĉe la radio okazas ankaŭ regule.

En la laboro de la societo partoprenis precipe la junaj samideanoj, plejparte gestudentoj.

**Plovdiv.** Post la fino de la kurso, gvidata de s-ano P. Kamburov, la esp. societo „Kulturo“ elektis kelkajn komi-

### PIONIROJ DE NIA NACIA RENESANCO.



**Prof. Marin Drinov**  
eminenta bulgara historiisto



**Georgi Rakovski**  
verkisto kaj apostolo de la bulgara libereco

la malnovaj esperantistoj instruu la novajn. La gvidantoj de la laboro povas alterni. Ili devas korekti la (hejme) faritajn ekzercojn, paroligi laŭte kaj en ĥoro la membrojn-lernantojn, klarigi la regulojn, forigi la malfacilaĵojn, doni trafajn ekzemplojn kaj respondi al ĉiuj demandoj de la novuloj.

**Sofia.** Dum la pasinta jaro la societo havis kontentigan nombron da membroj. Ĝi okazigis ĉiumerkrede siajn regulajn kunvenojn, en kiuj ĉefan lokon okupis la „ĵurnalo parolata“, tre varia laŭ sia sciencoplena kaj bonhumora materialo. Estis eldonitaj kelkaj numeroj de la „Mura gazeto“. La societo organizis du amuzvesperojn vizititajn de centoj da malnovaj samideanoj. S-ano Emil Stratev gvidis du kursojn por komencantoj. La biblioteko estis reordigita. Tiumomente

sionojn, inter kiuj estis dividita la laboro. En la salono de la legejo „Antim I“ oni okazigis regulajn ĉiusemajnajn esp. kunvenojn, en kiuj la tempo estis utiligita precipe por klarigo de lingvai demandoj. Dufoje en la monato la societo aranĝis „Vivan gazeton“ kun la partopreno de ĉiuj membroj. Dum la somero estis organizitaj esp. ekskursoj kune kun la sekcioj de la gejunularaj turistaj societoj „Ruen“ kaj „Zdravec“.

**Dâlbok-dol.** En la vilaĝo ekzistas kelkaj bonaj esperantistoj, kiuj fervore laboras. Ili instruas Esperanton al la komencantoj, farante larĝan propagandon antaŭ la loka loĝantaro. La esperantistoj estas precipe gejunuloj el la Koop-grupo, kie tre ofte estas legataj referatoj en Esperanto kaj en bulgara lingvo pri Esperanto.

## REDAKCIA POŝTO

**Bogomil Radoslavov**, v. Zlatarica. Viaj ideoj pri praktika uzado de Esperanto, pri reciproka helpado de la esperantistoj, k. t. p. estas tre interesaj. Ĉu vi ne povus verki specialan artikolon por B. E. je tiu ĉi temo? Ni atendas.

**At. Markov**, v. Bogdanica. Vidu la klarigon en „Bulgara Esperantisto“, n-ro 3-4, Marto-Aprilo 1941, paĝo 16.

**Vasil Iv. Krestev**, v. Altimir. Ne mal-esperu! Oni fariĝas verkisto per longa legado kaj ekzercado. La komenco estas bona. Rekomendindaj aŭtoroj: Zamenhof, Edm. Privat, Th. Cart, Ant. Grabovski, Julio Baghy, Kaloscay, k. c.

**Petrini**. Eĉ en gepatra lingvo, suĉata kune kun la lakto, la verkado estas malfacila afero. Des pli malfacile estas verki en internacia lingvo, kies gramatikon oni apenaŭ ellernis. Laboru!

**Georgo St. Geŝev**, Pazarĝik. Bona kiel ekzerco, sed netaŭga por publikigo.

**Murgin—Canko**, v. Galiĉe, Oreĥovsko. Ni jam presigas en tiu ĉi n-ro la rakonton „Ciganoj“ tradukitan de C. Todorov, Daŭrigu!

**Ivan M. Pejkov**, v. Kilifarevo. Preferu la prozon!

**D. Sasonov**. „Historio de la homaro“ atendas en la redakcia paperujo oportunan tempon.

L. Grin

### BIBLIOGRAFIO

#### LIBROJ KAJ PERIODAĴOJ RICEVITAJ

**Petro Danov**. En la regno de la viva naturo. Eldonis biblioteko „Nova kulturo“, Sevlievo, 90 paĝoj en 16<sup>o</sup>.

**6. aarsberetning fra J. E. Ohlsens Enkes plantepatologiske laboratorium**. (Sesa jara raporto de la Plantpatologia laboratorio de J. E. Ohlsens Enkes de 1 de aprilo 1940 ĝis 31 de marto 1941) kun resumo en Esperanto. Köbenhavn, J. D. Qvist kaj komp., 1941.

**Concours international d'articles sur la culture japonaise**. Statuts. Kokusai bunka shinkokai, Tokyo, Japon.

**Fáy András**. Elektitaj fabeloj. El hungara tradukis Maŭro. Luksa eldono. Dukolora preso sur girlanditaj paĝoj. Prezo 4 respkup. Eldonis Salaj Esperanto-libro-eldonejo, Budapeŝt.

**Henriko Fischer**. L. K. La fabelo pri la granda turo kaj la malgranda doktoreto, sekvata de aliaj konvinkigaj rakontetoj. Biblioteko de la propagandisto, № 1. Eldonas Esperanto-centro rumana, Bukaresto, str. Dr. Istrate 10. Prezo 10 centimoj svisaj. Tre efika propagandilo.

**Frateco** — monata gazeto por frata vivo, VII. jaro, n-ro 7-8, Julio 1941. Redaktoro At. Nikolov, Sevlievo, Bulgarujo. Enhavo: La penso — faktoro de ĉiu ago — de James Allen; Kuracistoj ĉe P. Danov — de Bojan Boev; Nova-

nutrado — de D-ro Kelog; — La monkesto (Bulgara popolfabelo); Lingvaj demandoj k. c.

**Esperanto** de U. E. A. 37. jaro, n-ro 489. (3). Majo—Junio 1941. Enhavo: Post la milito, de H. Kürsteiner; En Okcidento brilas la stelo (letero el Brazilo) de Ismael Cromez Braga; Renkonto, originala rakonto de Esperantina R. Triĉkova; La helpo al la familio Zamenhof; k. c.

**Svenska Esperanto-Tidningen — La Espero**. 29 jaro, n-ro: 6-7-8 k. 9. — junio ĝis septembro 1941. Enhavas raportojn pri la 35-a jara kunveno de la Sveda Esperanto-federacio, pri la Esperanto-tago en Jönköping, pri la renkontiĝo esperantista en Truve, pri la vivo en Cambridge, k. c.

**Hungara Heroldo**, oficiala organo de la Hungara Esperanto-federacio, 14-a jaro, n-ro 2, junio 1941. Enhavo: Gefratoj! — de J. Mihalik; Grafo Pól Teleki (nekrologo); Reĝo Béla IV. kaj la mongoloj en Hungarujo; La historia destino de Hungarlando en la baseno de la karpata montaro; Hungaroj kaj kroatoj; Raporto pri la XV-a Hungarlanda Esperanto-kongreso en Szentes (kun fotografiaĵoj), k. c.

**Cirkulero** — Sciigilo por anoj de la Hungarlanda katolika esperanta societo. Junio—Julio 1941. Budapeŝt, Géza str. 4. Enhavo: Japanaj leteroj — G. Kovács; Nia XV-a — de S.ino Mattayasovsky; Inundo — de F. Andrési, k. c.

**ПОЛУЧЕНИ КНИГИ:**

**Ат. Николовъ**, Есперанто-български речникъ, 208 стр. in 16°. Съ таблица за паричнитѣ системи на по-важнитѣ страни. Цена 25 лв. Книгоиздателство „Братство“, Севлиево. Практиченъ наръчникъ, необходимъ за всѣки български есперантистъ.

**Ат. Николовъ**, Есперанто-български разговорникъ, 48 стр. in 16°. Съдържа най-необходимитѣ изрази, които се употребяватъ въ частния и общественъ животъ, а сжщо и нѣколко образци за писма на Есперанто. Полезно помагало за нови есперантисти. Цена 8 лв. Книгоиздателство „Братство“, Севлиево.

**Ив. Шиваровъ**. Скици безъ ретушъ. Съ предговоръ отъ Йор. Ковачевъ, а винетки и илюстрации отъ художника Николай Шмиргела. Севлиево, 1941 г. Доставка авторътъ, гр. Бѣла-Слатина. Цена 20 лв.

**Братство**, двуседмичникъ за братски животъ. Год. XIII и XIV, бр. 280, 281 и 282, юлий, августъ и септември 1941. Редакторъ Ат. Николовъ, Севлиево.

Абонаментъ за България 35 лв. Отдѣленъ брой 2 лв.

**Технически гласъ**, органъ на дружеството на българскитѣ техници съ срѣдно образование, год. XII, бр. 270—272. София, юний—септември 1941. Редакторъ Л. Стефановъ.

**Селска община**, органъ на съюза на селскитѣ общини въ България. Год. I, бр. 4. с. Килифарево, 17. августъ 1941 г. Редакторъ Тодоръ Д. Новаковъ. Год абонаментъ 60 лв.

**Дунавска трибуна**, седмичникъ за информация и стопанска просвѣта. Год. XVII, бр. 467. Горна Орѣховица, 19. юлий 1941 г. Ред. Тодоръ Ив. Костовъ. Абон. за год. 60 лв.

**Сава Калименовъ**, Френско-български речникъ. Съ произношение на думитѣ и съ една таблица за спрежение на неправилнитѣ глаголи, 312 стр. in 16°. Цена 50 лв. Книгоиздателство „Братство“, Севлиево.

**А. С. Пушкинъ**. Цигани. Поема. Преведе отъ руски Симеонъ Гатевъ. 24 стр. Цена 4 лв. Книгоиздателство „Братство“, Севлиево.

**Deziras korespondi:**

■ S-ro Petâr H. Tanev, librobindisto — 697, str. Sv. Kiril i Metodi — Ĉirpan, Bulgarujo, deziras korespondi kun gesamideanoj. Tuj respondas.

■ S-ro Georgi St. Gešev, lernanto 17-jara — v. Varvara, ok. Pazarĝiška — Bulgarujo — deziras korespondi kun gesamideanoj el ĉiuj landoj.

■ Edit Maria Recsnik, Budapest, VII, Nyárutca 36. I. 8.

■ Augusta, Barbara Franciska Oborny (kis Fenség) Budapest X. Gergely — u. 68. fsz. 12.

■ Marta C. Miks, Mi-Ko-Fog. Budapest VIII. Lujza — u. 22. I. 1.

■ Árpád Bauer, univ. stud. Budapest IX. Högyes E. — u. 8. I. 23.

■ Irena Lieber — Pütyür, Budapest VIII. Maria — u. 9. I. III.

**ИЗЛЪЗОХА ОТЪ ПЕЧАТЪ:**

**Френско-български речникъ**, отъ Сава Калименовъ, съ произношение на думитѣ и таблица на неправилнитѣ глаголи. 312 стр. голѣмъ форматъ, Цена 50 лв.

**Есперанто-български речникъ**, отъ Атанасъ Николовъ, цена 25 лева.

**Есперанто-български разговорникъ**, отъ Атанасъ Николовъ, цена 8 лева.

**Цигани**, поема, отъ Ал. С. Пушкинъ, преведе въ стихове Сим. Гатевъ. Цена 4 лева.

И четиритѣ книги сж издания на книгоиздателство „Братство“ — Севлиево.

Търсете ги по всички книжари или иаправо отъ издателството.